FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 3 | Julio/Septembro 2002



Hauptbeauftragter Rolf Terjung
bei Eröffnung des 54. IFEF-Kongresses
am 2. Juni 2002 in Plovdiv

Impresoj de la Germana Esperanto-Kongreso en 2002

La Germana Esperanto-Kongreso okazis dum pentekosto 2002 en Husum je la rando de la Norda Maro. Pri du interesaj okazaĵoj ni ŝatus informi vin.

Unue: Dum pentekosta lundo okazis ankaŭ mallonga kunveno de la ĉeestantaj fervojistoj sub la gvido de Bodo Ehrlich. Sume estis tie sep fervojistoj, sed ĉeestis dum tiu kunveno nur ses (kaj aliaj), ĉar la sepa – sinjoro Henning Haüge devis kunorganizi la kongreson. Sinjoro Olsen el Danlando prezentis sian informprelegon pri la nova pagkarto por publikaj veturiloj en Danio. La ĉeestantaro diskutis ĝin, starigis demandojn kaj donis konsilojn rilate de la uzo de la karto.

Due: La saman tagon okazis vadmigrado de la firmtero al la haligo (insuleto sen digo) Nordstrandischmoor. Survoje pasis trajneto, kiu estas la ligo inter la haligo kaj la cetera mondo. Ĝi servas por provizi la insuleton kaj ties 17 enloĝantoj kaj por transporti la poŝtiston, bestojn kaj eĉ normalajn homojn (gastoj por la feri-loĝejoj). Temas pri simpla veturilo kun dizela motoro kaj ĝi veturas sur reloj de la ŝpuro de 600 mm, kiuj estas fiksitaj en la parto trans la vado sur betona relvojkorpo. Dum alta tajdo la trako estas nevidebla, ĉar ĝi troviĝas sub la akvonivelo. Sur la haligo estas eĉ trakforkoj, ĉar ekzistas „stacio", kie staras la ne ĉiam bezonataj varvagonoj. La instalaĵo havas sur mapoj la nomo „Lorenbahn".

Walter Ullmann



Ni kongresis en Bulgario

La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) invitis ankaŭ en tiu jaro al sia tradicia kongreso, intertempe la 54a en sia eventoriĉa historio. Niaj bulgaraj gekolegoj transprenis tiun nefacilan taskon. Inter la 1a kaj 8a de junio 2002 ili organizis je la tria fojo kun vervo la IFEF-kongreson en sia lando, en la antikva urbo Plovdiv situanta sur tri altaĵoj. Kiel aliaj kongresanoj el okcidentaj landoj ankaŭ la raportanto preferis vojaĝi aviadile, almenaŭ ĝis la ĉefurbo Sofia. Sed sekvis ankoraŭ kelkhora veturado per trajno, ĝis kiam en la stacidomo de Plovdiv li povis ricevi la kongresdokumentojn.

Jam surprizis la enloĝigo en alia hotelo ol mendita. Aliaflanke en la hotelo kun la fiera nomo St. Petersburg troviĝis la kongresejo. Surprizis ankaŭ okazaj ŝanĝoj en la programo de la lukse presita kongreslibro.

Dimanĉon matene, post diservo en proksima ortodoksa preĝejo, kolektiĝis la kongresanoj por la solena inaŭguro. Eminentuloj de fervojo, ŝtato, urbo kaj Esperantomovado dediĉis koran bonvenon al la ĉeestantoj. Inter ili estis la vicministro por transporto/trafiko, la vicurbestro de Plovdiv, la prezidanto kaj la bulgara reprezentino de la Internacia Federacio por Kulturo kaj Libertempo de Fervojistoj (FISAIC), la prezidanto de la Bulgara Esperanto-Asocio kaj aliaj. Tiu tago estis ankaŭ datreveno pri la liberiĝo post 500 jara turka jugo.

Laŭ tradicio salutis poste la reprezentantoj de landaj asocioj: Aŭstrio, Ĉeĥio, Danlando, Germanio (vidu la bildon), Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kroatio, Norvegio, Rumanio, Slovenio kaj la gastiganta Bulgario. La ceremonion akompanis kantoj de bele vestita virina koruso (vidu la bildon paĝo 4).

Dum tiu kongreso la oferto je fervojfakaj prelegoj estis mirige granda. Renkontis fortan intereson la ĉefa fakprelego „La reformo en Bulgaraj Ŝtataj Fervojaj (BDZ) – paŝo al integrigo al la Eŭropa Transporta Sistemo". Aliaj temoj koncerne la BDZ estis:

- Kalkulo pri socialekonomika efektiveco de l' pasaĝeraj transportoj laŭ merkantilaj segmentoj;
- Kvalito de la pasaĝerservoj de la fervoja transporto;
- Specialiga priservado de malfacile moveblaj personoj pere de fervoja transporto;
- Variantorganizado ĉe la transporto de la pasaĝeroj kadre de la urbo Sofia dum 2002;
- Renoviga gruzo per konstrukciaj tavoloj de tera bazo de fervojlinio;
- La muzeaj tradicioj ĉe la Bulgaraj Fervojoj.

Krome prelegis la jugoslava delegito pri „Trafikaj koridoroj", la dana delegito pri „Projekto kunlaboro busoj – trajnoj" kaj la ĉeĥa delegito pri „Danĝero sur traknivelaj pasejoj de ĈD". La Terminare Komisiono difinis novajn fervojajn terminojn aldone al la ekzistanta Fervoja Terminaro.



IFEF-Kogress 2002 in Plovdiv
Frauenchor bei der Erföffnungsfeier

En la plenkunsido la IFEF-estraro pritraktis kun la landaj delegitoj (komitatanoj) funde la agadon de la pasinta jaro kaj la programon pri la estonteco. IFEF suferas kiel aliaj organizaĵoj pro konataj kaŭzoj je malkresko de membroj. Pro demisio de la meritplena Henning Haŭge (Danio) estis elektata Vignaŭd Laŭrent (Francio) kiel nova kasisto de IFEF. Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) invitis al la 55a IFEF-kongreso en Dresden. Pri la kongresurbo Dresden kaj aliaj vidindaĵoj oni montris poste diapositivojn. Niaj aŭstraj kaj hungaraj gekolegoj organizos en 2004 la IFEF-kongreson en Sopron (Hungario). FISAIC-prezidanto Gilbert Schmit sekvis la plenkunsidon kun granda intereso.

La urbo honorigis la kongreson ankaŭ per akcepto de la estraro, delegitoj kaj organizantoj. En la granda salonego de la kongresejo oni kolektiĝis vespere al abunda ban kedo. Kiu sentis sin sufiĉe forte, povis danci ĝis noktmezo je bedaŭrinde tro laŭta muziko. Dum tri aliaj vesperoj la gastigantoj ofertis allogan programon. Post klasika muziko kaj kantoj oni aŭskultis belsonajn voĉojn de bele vestitaj virinoj, sed la kulminon atingis folklora dancensemblo de fervojistoj. Dum alia vespero la kongresanoj ĝuis poemojn, kantojn, muzikaĵojn parte prezentitajn per blindaj esperantistoj. Ke la bulgara Esperanto-teatro estas ankoraŭ aktiva, pruvis elokvente kelkaj ludantoj en la origina, sed iom naiva teatraĵo „Invento de l'jarcento".

Neniu kongreso sen ekskursoj. Jam dimanĉon, post la inaŭguro, oni veturis per buseto al la urba centro, kie regis vigla vivo. Gvidantino informis pri la eventoriĉa historio de la urbo. La pavimŝtonaj stratoj pruvis, ke la historio de Plovdiv komenciĝis antaŭ pli ol du mil jaroj. La romia epoko postlasis ruinojn de teatro. En ortodoksa preĝejo la vizitantoj hasarde fariĝis atestantoj da emocia edziiĝo. En la etnografia muzeo multe interesis la eksponaĵoj pri la vivo en antaŭaj jarcentoj. Duontaga ekskurso kondukis unue al la vilaĝo Ĉernozem. Tie oni produktas rozan akvon kaj rozoleon. Bona flaranta flakono troviĝis inter la kongresdokumentoj. Dum la daŭriga veturado estis videblaj multaj, vastaj kampoj de rozoj. La ekskursantojn atendis la urbeto Koprivŝtica, laŭ gvidlibro muzeo de nacia bulgara arĥitekturo. Tipaj estas la surpendantaj tegmentoj de lignaj domoj. En la preĝejo la popo donis klarigojn pri la ortodoksa rito. En tiu urbeto komenciĝis en 1876 la ribelo kontraŭ turkaj okupantoj. Sur la programo de la tuttaga ekskurso staris tri celoj. Unue la ĉefurbo Sofia. Bedaŭrinde la tempo sufiĉis nur por vidi kelkajn konstruaĵojn, precipe la pompan memorigan preĝejon Aleksandro Nevski kaj la grandiozan katedralon Sankta Sofia. La sekva veturado estis longa. Ĝi kondukis tra parte solecaj kaj arbaraj stratoj, ĝis kiam ekaperis la grandega klostro en la Rila-montaro. En la malhela preĝejo soleca monaĥo, ekstere multnombraj religiaj pentraĵoj sur la muroj. Postrestis profundaj impresoj, neforgeseblaj. Kontraste al tio la tria celo, la ripozloko Borovec. Modernaj hoteloj kaj restoracioj, sed ŝajne mankas turistoj. Tre malfrue la ekskursantoj atingis sian hotelon.

La kongreso atingis sian finon. Dum la fermo la IFEF-prezidanto Romano Bolognesi (Italio) esprimis sian dankon al la organizantoj de la kongresa semajno. Rolf Terjung kiel LKK-prezidanto invitis al la venontjara kongreso en Dresden kaj transprenis la federacian flagon. La kongresanoj, inter ili bedaŭrinde nur malmultaj germanoj, adiaŭis post harmoniaj tagoj. Grupo da postkongresanoj ekveturis al la Nigra Maro. Dankon al la bulgaraj gekolegoj kaj ĝis revido venontjare en Dresden.

W.B.



Grupo Bremen

Elsfleth – la celo de nia Maja Ekskurso

haveno, marista altlernejo kun ŝipmanovra bazeno, planetario kaj belega veltrajnŝipo "Großherzogin Elisabeth". Elsfleth estas urbeto 30 km norde de Bremen. 9000 enloĝanta, marista urbo kun transmara

La 11an de majo estis Elsfleth okupita per Esperanto. Kune kun la tiea grupo ni estis rimarkebla grupo kiu marŝis tra la beleta urbo kaj admiris la vidindaĉojn, gvidita de sperta ĉiĉerono. Ni tre volonte sekvis la inviton de la grupo Subvisurgo (Unterweser) aranĝita de la senlaca s-ino Reintraud Dietrich kune kun diligentaj grupanoj. Ni venis kun plezuro, ĉar ni jam de longe estas ligita kun la subvisurganoj. Kelkaj el niaj membroj biciklis al Elsfeth, ĉiam laŭlonge de la Weser-rivero ili veturis sur bonaranĝita biciklomigradvojo. Post la urbrondirado ni kunvenis en la domo de s-ino Dietrich por kafotrinkado. La rondo estis bonhumora kaj gaja, la de la membroj bakitaj kukoj tre bongustis kaj ĉiuj partoprenantoj evidente estis kontentaj.Precipe unu el la tortoj gajigis la ĉeestantojn! Temis pri vin-poma torto kreita de la membrino Gisela Baermann. La plej gravaj ingrediencoj estis tuta botelo da vino, rumo kaj ovolikvoro. Sendube estis ankaŭ aliaj ingrediencoj, sed mi menciis nur la plej gravajn.

Por kontentigi la scivolemon de la legantoj jen la recepto de la vin-poma torto:

La Elsfletha Esperantotorto

La murbo:
200g faruno
100g sukero
100 – 150g butero
1 kulereto da bakpulvoro
2 p. vanilpudingpulvoro
2 p. vanilsukero
1 ovo
iom da rumo

La surmetaĉo:
1000g pomoj (Jona-Gold)
250g sukero
3/4 litro da vino
2p vanilpudingpulvoro

La proceduro:
Brezu senŝeligitajn kaj tranĉitajn pomojn en iom da vino, aldonu la sukeron.
Verŝu tion en kuirpoton kaj aldonu la reston de la vino kaj la vanilpolvoron. Miksu kaj kuiru.
Metu la murbon en formon. (26 aŭ 28 cm) Donu la malvarman pommiksaĉon sur la murbon kaj baku 1 horon je 200 gradoj.
Donu la sekvontan tagon 400g batitan kremon kun iom da ovo-likvaĉo super la torto.
Bonan apetiton!

La fino estis la vizito de la proksima miljara St. Nikolai-Preĝejo, kiu tre impresis nin. Sur la ĉirkaŭa tombejo ni vizitis la tombon de nia amiko kaj fondinto de la grupo Subvisurgo Alfred Dietrich.

Kun sincera danko pri la unike bela kunesto en Elsfleth kaj la afabla gastigado ni adiaŭis. La biciklantoj tretis forte la pedalojn kaj la aŭtomobilistoj direktis la ĉarojn hejmen.

Ĝis revido en Bremen laŭeble baldaŭ, karaj geamikoj en Elsfleth. Hg



Informoj pri la Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Dresden

Invitiloj/aliĝiloj estas haveblaj per via distriktkomisiito, per Dr. Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2, 01445 Radebeul, Tel.: +49 351 8 385 877; per Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 47279 Duisburg, Tel/Fakso: +49 203 724 095; per 55a IFEF-kongreso, Postfach 100 425, 61144 Friedberg, Tel/fakso 06031-46 17 aŭ per 55a-ifk@web.de.

Glumarkoj. Niaj belaj glumarkoj kostas 0,10 € pro peco. Ili estas haveblaj jene: Menciu vian deziron en via aliĝilo (aŭ en aldonita slipo) kaj sendu la monon kune kun via kotizo al la konata bankkonto. Alia ebleco: Se vi loĝas en Germanio, vi ankaŭ povas mendi ilin per letero al Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 47279 Duisburg. En tiu kazo donu la monon por la glumarkoj simple en koverton per kiu vi mendas ilin.

La **„ibis" Hoteloj** en Dresden ofertas du diversajn tipojn de dulitaj hotelĉambroj: „Twinbed" kaj „Grand Lit". „Twinbed" estas ĉambro kun du disigitaj litoj kaj en „Grand Lit" troviĝas unu 1,60m larĝa lito. Bonvolu menciu vian deziron en via „aliĝilo". Ĉe la hotelo troviĝas sufiĉe da senkostaj parklokoj por aŭtomobiloj.

Fervojaj novaĵoj

Hartmut Mehdorn, estrarprezidanto de la Germana Fervojo (DB), ĝojas, ke iamaj DB-fervojistoj multe interesiĝas pri la nuna stato de DB. Pro tio ankaŭ ili ricevas kun la BSW-Magazin senkoste ankaŭ la gazeton BahnZeit.

Videblaj estas DB-lokomotivoj, kiuj portas sur sia surfaco pagitajn reklamojn pri produktoj de fremdaj entreprenoj. Kiam oni reklamas tiamaniere por Esperanto?

En la regiono ĉirkaŭ Dresden la fervoja reto multamplekse estas renovigata. Esenca celo estas separigi la kurtdistancan, longdistancan kaj vartrikon. Tio necesigas konstruon de novaj, elektronikaj regadejoj, fervojlinioj kaj ponto tra rivero Elbe. Ĝis 2012 la kostoj por investoj estos 1,1 miliardoj da Euro.

La telekomunika kabloreto de DB, kiu en 1997 estis vendita al la industria entrepreno Mannesmann, apartenas depost aprilo 2002 almenaŭ grandparte denove al DB. Tiucele estas fondita la kompanio Arcor DB-Telematik.

Sekve de adjudiko du privataj fervojoj ekspluatos ekde 2003 la fervojan reton Ems-Senne-Weser. Temas pri la fervojlinioj Münster-Bielefeld, Bielefeld-Paderborn, Paderborn-Holzminden, Bielefeld -Altenbeken. Germana Fervojo malgajnis la konkuradon preskribitan de la Eŭropa Unio.

DB intencas ŝpari personaron en bileteldonejoj kaj informejoj. Ekde 2005 privataj budikoj povos vendi biletojn anstataŭ DB-bileteldonejoj. Ankaŭ maljunuloj malspertaj devas uzi biletaŭtomatojn. Taksoj pri detalaj fervojaj informoj per telefono plialtiĝos. Aliflanke por simplaj demandoj estas disponebla elektronika voĉo senkoste.

La kombinita vojaĝsistemo per fervojo kaj flugo AIRail, prezentita en Internacia Fervojisto 2001.5 sub la surskribo „Per trajno al flugo" plietendiĝas. Fine de 2002 flugpasaĝeroj povos ekspedi sian bagaĵon por la transporto per aviadilo jam en la stacioj Düsseldorf, Köln kaj Bonn.

En 2002/2003 triono de la 13000 DB-varvagonoj estos kompletigata per satelita dedektilo. Tio ebligas centraligatan direktadon de la vartrafiko per lokazidado de varvagonoj.

La vartrafika centralo DB Cargo enkondukis por varvagonoj mobilan elektronikan sekurilon, kiu kaze de enrompo blokas la malfermon de vagonŝloso kaj samtempe informas la sekurigan centralon. Tiu alarmas la proksiman policejon.

La nova motorvagonaro VA 646 havas en la mezo la trakcimovigan dizelan motoron en separata vagono. Antaŭe kaj malantaŭe troviĝas po unu pasaĝervagono kun kondukistejo. Pasaĝeroj povas trapasi la koridoron de la motorvagono.

Rapidlimigejoj en la DB-reto estis 374 en 2000. En 2001 ili regresis al 183.

En 2003 la tunelo apud Schlüchtern (fervojlinio Frankfurt-Fulda) estos riparata. Samtempe estos konstruata aparta tunelo. En 2007 ekfunkcios du paralelaj tuneloj kun po unu relvojo.

Al interesuloj pri modelfervojoj la ekspozicio Eurospoor en Utrecht montro inter la 19a ĝis 21a de oktobro 2002 centojn da modeltrajnoj, inter ili modelon de la trajna Metropolis.

Fonto: BahnZeit W.B.

Unser GEFA-Präsident Joachim Giessner hat ab 1. August eine neue Anschrift.
Nia GEFA-prezidanto Joachim Giessner havas novan adreson ekde 1a de aŭgusto:

Joachim Giessner
Am Jüdenhübel 13
(DE) 67705 Trippstadt (Pfalz)
☎ (06306) 82-3 01

Ni funebras

† Andreas Mann
Am 10. April 2002 verstarb unser treues Mitglied Andreas Mann, Region Nordwest, im Alter von nur 53 Jahren. Seiner Frau (ebenfalls unser Mitglied) und allen Angehörigen gilt unsere aufrichtige Anteilnahme.

Klaus Böhnke
25 Jahre Bezirksbeauftragter für Esperanto

Als Werner Lepke, der langjährige Bezirksbeauftragte für Esperanto des Bezirks Hamburg, vor 25 Jahren in Ruhestand ging, sollte ein „Aktiver" diese ehrenamtliche Tätigkeit übernehmen. Klaus Böhnke war sofort bereit und hat sich seitdem mit Elan und Energie für unsere Sache mit großem Erfolg eingesetzt. Die von ihm geleiteten regelmäßigen Treffen sind stets inhaltsreich und interessant - und darum auch gut besucht. Es gelang ihm, etliche Mitglieder hinzu zu gewinnen. Er hat nicht nur an fast allen nationalen und internationalen Kongressen der Eisenbahn-Esperantisten teilgenommen, sondern hat auch elbst solche Treffen organisiert. Bei allen Teilnehmern ist sicher die 38. GEFA-Jahrestagung 1994 in Lübeck noch in guter Erinnerung. So hat er auch außerhalb Deutschlands viele Freunde gewonnen. Aber auch außerhalb der Eisenbahnerkreise versteht er es, für unsere Sache zu werben. Es vrgeht kaum eine Veranstaltung von anderen Organisationen in seinem Umfeld, in denen Völkerfreundschaft und -verständigung gepriesen wird, ohne dass er das Wort ergreift und darauf hinweist, dass zur Völkerverständigung Esperanto bestens geeignet ist.

Mach weiter so, lieber Klaus! WL

❀ ❀ ❀

Aŭtuno transfigurita

Finiĝas pompe nun la jar´
Kun ora vin´ kaj fruktriĉeco.
Silentas ĉie la arbar´,
nin akompanas en soleco.

Nun klinas jam la suno sin.
Vi sonoriloj de vespero,
nin kuraĝigu je la fin!
Forflugas birdoj tra l´aero.

Tre belajn bildojn vidas ni,
sur la rivero veturante.
La temp´de l´amo estas ĝi -
Ripozas ni nun siletante.

Verkita de la poeto Traklo, Georgo
(1887 - 1914)
Esperantigis (iom libere) Manfredo Ratislavo
Laŭ la origina germanlingva testo

Verklärter Herbst

Gewaltig endet so das Jahr
Mit goldnem Wein und Frucht der Gärten.
Rund schweigen Wälder wunderbar
Und sind des Einsamen Gefährten.

Da sagt der Landmann: Es ist gut.
Ihr Abendglocken lang und leise
gebt noch zum Ende frohen Mut.
Ein Vogelzug grüßt auf der Reise.

Es ist der Liebe milde Zeit.
Im Kahn den blauen Fluss hinunter
Wie schön sich Bild and Bildchen reiht -
Das geht in Ruh und Schweigen unter.

Origina germanlingva teksto de GEORG TRAKL
(1887 - 1914)
Tiu ĉi poemo troviĝis presita en la germana eklezia
gazeto "Kirche und Leben" ("Eklezio kaj Vivo")

Krucvort-ciferenigmo

1	5	6	2	7	3	7
5	■	5	12	4	■	1
9	5	8	■	17	10	5
5	■	11	■	12	■	9
13	16	5	8	11	12	13
S	**P**	**E**	**K**	**T**	**A**	**S**
11	5	■	6	■	13	14
6	■	9	10	9	■	2
7	1	14	15	5	3	7

1._____ 10_____

2._____ 11._____

3._____ 12._____

4._____ 13._____

5._____ 14._____

6._____ 15._____

7._____ 16._____

8._____ 17._____

9._____

Anstataŭu la ciferojn per literoj. Samaj ciferoj signifas samajn literojn. Eltrovu la literojn per kombino. Kelkaj estas donitaj per la enskribita ŝlosil-vorto. El ĝusta solvo rezultas kompleta krucvortenigmo.

Ersetze die Zahlen durch Buchstaben. Gleiche Zahlen bedeuten gleiche Buchstaben. Finde die Buchstaben durch Kombinieren heraus. Einige sind durch das eingetragene Schlüsselwort vorgegeben. Bei richtiger Lösung ergibt sich ein vollständiges Kreuzworträtsel. FL



Lösung des Silbenrätsels aus Nr. 2/02:

1. jarnajlo, 2. alvenhalo, 3. radakzo, 4. kajo, 5. ungokejlo, 6. nadlorelo, 7. varvagono, 8. ekrano, 9. navettrajno, 10. oficejo.

SELBST NUTZEN ***WEITEREMPFEHLEN***

ESPERANTO - FERNKURSE

I

ESPERANTO – EINE LEBENDIGE SPRACHE

EINFÜHRUNGSKURS

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- Korrekturen
- Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 16 €

II

FORTBILDUNGSKURS

KONVERSACIA KURSO

Viele Situationen des täglichen Lebens werden als Gesprächsstoff behandelt.

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

KOSTEN: 21 €

leicht und bequem daheim lernen

Bestellen bei: Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf:
Konto 953 729 bei Sparda-Bank Frankfurt (M), BLZ 500 905 00

Redaktfino por FE 4/2002 estos la 15.11.2002
Stiftung Bahn-Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schritfleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361, E-Mail: horst.jasmann@web.de